

NORDHUNGARIA INFORMO

Informilo de „Király Lajos” Esperanto Amika Rondo

ÉSZAKMAGYARORSZÁGI HÍR

A „Király Lajos” Eszperantó Baráti Kör Tájékoztatója

2007. június
Junio 2007.

JÚNIUS	3
A nagy igazság	3
JUNIO	4
La granda pravo	4
INVITO	5
Narancsos Káv	6
Oranĝa kafo	6
Szabó Lőrinc Dubrovnikban	7
DSUANG DSZI ÁLMA	7
Laŭrenco Szabó, la poeto en Dubrovnik	8
SONĜO DE ĜUANG DZI	8
Magyarország vonatai	9
Trajnoj de Hungario	11
Poemo omaĝe al la Tero	14
La lastaj tagoj de Ada, Aduŝka	16
La birda influenco	25
A madár influenza	26
Viccek / Ŝercoj	28
MEZŐKERESZTES	29
MEZŐKERESZTES	30
LA VORTARO	31
A SZÓTÁR	32
Klingoklango	33
Anekdóta	33
Anekdoto	34
Kóma	34
Komato	36
Situacio de la Judoj en Danio 2007	37
A zsidók helyzete 2007-ben Dániában	39
Jubileo	39

JÚNIUS

Június az év hatodik hónapja és Júnó (latin nevén Iuno) római istennőről nevezték el. Júnó: az ég istennője, a házasság és a születés védnöke Jupiternek, a római mitológia főistenének volt a felesége. Juniust a népi kalendárium Szent Iván havának nevezi.

Ehhez a hónaphoz több nevezetes nap kapcsolódik. Így pl. több szentünk névnapja, különböző nemzetek nemzeti ünnepei és egyéb nevezetességek is a hagyományaink szerint.

Néhány ezek közül: VI.1: Bulgáriában a rózsák ünnepe, VI.5: Környezetvédelmi Világ Nap, VI.8: Szent Medárd napja, VI.10: Portugália nemzeti ünnepe, VI.13: Szent Antal ünnepe, VI.15: Dánia nemzeti ünnepe, továbbá Svédországban és Finnországban ekkor van a Nyárközép ünnepe, VI.17: Az Apák Napja Magyarországon, VI.22: Horvátországban: az Antifasiszta Harc emléknapja,

VI. 23: Szent Iván napja: amikor az év leghosszabb világos napjának éjjén tüzeket gyújtanak a világosság meghosszabbítására, a szentelésre és a tisztításra. A néphit szerint akik ekkor a tüzeket átugorják, egészségesek maradnak egész évben, VI.25: a Barlangok napja, VI.27: Szent László napja I.László királyunk emlékére, VI.29: Szent Péter napja, VI.30: Szent Pál napja, az aratás kezdete Magyarországon. Juniuban ér véget az iskolai oktatás és kezdődik meg a nyári tanítási szünet.

Megkérdeztem egy kisgyermeket, örül-e a tanév végének. A választ: A Nagy Igazság – címmel olvashatják.

Pásztor Lászlóné

A nagy igazság

Autóbusszal történt egyik utazásomkor láttam, hogy az autóbusz tele van gyerekekkel. Úgy tűnt, hogy kirándulásból tartanak hazafelé, vagy éppen kirándulni mennek. Megszólítottam a mellettem ülő fiúcskát:

- Kirándultál az osztálytársaiddal?
- Nem, - válaszolta a gyermek – az osztálytársaimmal egy közülünk való osztálytársunkat látogattuk meg, aki egy Miskolc melletti faluban lakik.
- Beteg?- kérdeztem.
- Nem, nekik most lett egy nagy házuk óriási füves résszel és meghívtak bennünket, hogy azt megnézzük – válaszolta a gyermek.
- Tényleg olyan nagy a ház és a porta?
- Igen, valóban nagy, de a fűvön sajnos nem futbalozhattunk, mert még kímélni kell, nem régen vetették.
- Hanyadikos vagy?- kérdeztem én újra.
- Most fogom befejezni az elsőt. – büszkélkedett a cseppség.
- Örölsz az év végének és a közelebbi nyárnak?- kérdeztem én.
- Igen, de évközben sok szünidőnk volt, így a tanév hamar elmúlt.
- Mi volt a legjobb az iskolában?- kíváncsiskodtam tovább.
- Mi? Mi? Hát az, amikor kicsengettek és kimehettem az iskola udvarára focizni az osztálytársaimmal.

- Van fivéred akivel otthon is focizhatsz? Szoktál? – kérdeztem újra.
- Igen, de az iskolai jobb!
- Miért?
- Ó, néni! El tudod Te fogadni az én nagy, nagy igazságomat? Azért jobb az iskolai foci, mert otthon mégsem lehet egyszerre 21 testvérem a foci-meccshez!

Pásztor Lászlóné

JUNIO

Junio estas la sesa montato de la jaro. Ĝin oni nomis pri la romia diino Juno (latin-nome Iuno) ; kiu estas la diino de la ĉielo, la ĉefprotektanto estas de la geedziĝoj kaj la nasko, edzino estis de Jupitero: la ĉefdio de la Romia mitologio.

La popola kalendaro nomas Junion: monato de Sankta Ivano.

Pluraj famaj tagoj, mondotoj, eventoj, kutimoj ligiĝas al tiu monato. Inter ili ekz:

La 01.VI.: en Bulgario Festo de la Rozoj, 05. VI: Regionodefenda Mondotago, 08.VI. Tago de Sankta Medardo (se tiam pluvas, pluvos dum la sekvaj 40 tagoj), 10.VI. Nacia Festo de Portugalio, 13.VI: Festo de Sankta Antono, 15. VI: Nacia Festo de Danio krome en Svedio kaj Finnlando tiam oni festas la Somermezon, 17.VI. Tago de la Patroj en Hungario, 22.VI: en Kroatio estas la Memortago de la Antifaŝista-movada batalo, 23.VI: Tago de Sankta Ivano: kiam dum la nokto de la plejhela tago de la jaro oni ekbruligas fajrojn por plilongigi la tagan lumecon, antaŭhelpi la sanktigadon kaj la puriĝon. Laŭ la popolkredo: kiuj tiam trasaltas super la fajro, tiu sana restas dum la tuta jaro, 25.VI: Tago de la Gotoj, 27.VI: Tago de Sankta László/Ladislao je memoro de nia reĝo László I-a, 29.VI: Tago de Sankta Petro, 30.VI: Tago de Sankta Paŭlo: Komenca Tago de la rikolto en Hungario. En junio finiĝas la lerneja instruado kaj komenciĝas la somera ferio.

Mi demandis iun etinfanon, ĉu li ĝojas pro la fino de la studjaro? Lian respondon vi povos legi per la titolo: La Granda Pravo.

Adrienne, s-rino Pásztor

La granda pravo

Dum mia unu aŭtobusa vojaĝo mi vidis, ke la veturilo plenplena estis per infanoj. Ŝajnis, ili estis ekskursi, aŭ ĵus vojaĝas tien.

Mi alparolis la apud mi sidantan knabeton:

- Ĉu vi ekskursis kun viaj samklasanoj?
- Ne, - respondis la infano – kune kun miaj samklasanoj mi vizitis nian el inter ni estantan samklasanon, kiu loĝas en Miskolc apuda vilaĝo.
- Ĉu li malsanas? – demandis mi.
- Ne, ili nun ekhavis grandan domon kun grandega herbejo, kaj li kune kun la gepatroj invitis nin por rigardi ĝin.
- Ĉu ĝi estas vere tiome granda?
- Jes, ĝi estas vere granda, sed ili ne permesis nin iri sur la herbejon por piedpilkudi,

Ĉar la preskaŭ nun semitan novan herbon ni devis damaĝi.

- Kiom klasa vi estas? – demandis mi plue.
- Mi nun finas la bazlernejan unuan – fierdiris la etulo.
- Ĉu vi ĝojas por la lernojar-finiĝo kaj al la proksimiĝanta somero?- demandis mi.
- Jes, sed dumjare ni havis multan ferion, tiel la lernojaro rapide forpasis.
- Kio estis la plej bona en la lernejo? – scivolemis mi.
- Kio? Kio? Do... tio, kiam oni sonoriligis la finon de la studhoroj kaj mi povis iri sur la lernejkorton por piedpilkludi kun miaj klaskamaradoj.
- Ĉu vi havas fratojn, kun kiuj vi povas piedpilkludi ankaŭ hejme? Ĉu vi kutimas agi tiel?
- Jes! Sed la lerneja ludo estas pli bona!
- Kial?- demandis mi denove.
- Ho, onjo! Ĉu vi povas akcepti mian grandan, grandan pravon, ke tial estas pli bona la lerneja piedpilk-ludo, ĉar hejme samtempe mi ne povas havi 21 fratojn al la piedpilkmaĉo!

Adrienne, s-rino Pásztor

INVITO

Karaj gesamideanoj!

Mi kore invitas VIN al MARIBOR. Ni preprais tre interesan programon el tri partoj: temoj pri EEU kaj Esperanto. Ĉeftemo estas "Akvoj difinas la estonton" en kiu prelegos 6 esperantistaj kaj neesperantistaj fakultoj, interalie dro Burchards el Hamburgo, dro Dudich el Budapeŝto, sinjorino Auderskaja el Ukrainio, Sinjoro Fleury el Kanado, eŭropa konferenco "Interkultura dialogo kaj komunikado" en kiu interalie prelegos eŭroparlamentaninoj M. Handzlik kaj Lj. Novak, dro Sean O' Riain kaj tre riĉa kulturprogramo. Kompreneble je dispono estos ejoj por apartaj diskutoj de la Lingvolanĉilaj ideoj. Ne hezitu. aliĝu laŭeble rapide.

Zlatko Tišljar
(Lingvolanĉilo)

Kérem, fogadjanak el egy kis frissítőt
Íme, a

Narancsos Kávé

Erősen pörkölt (kézzel szedett) afrikai kávéból készítem úgy, hogy a frissen őrölt kávéra a főzés előtt néhány csepp narancslikőrt, vagy narancs aromát, vagy kifacsart fél narancs levét öntöm. Ezután a kávé megfőzöm. A főzéshez kávéprést használok, és borszeszégőt. Így láthatom a lassan leszálló kávészemcséket.

Tálaláskor a tetejét reszelt étcsokoládéval (feketecsokoládéval) meghintett tejszínhabbal és finomra reszelt narancshéjjal díszítem

Kiss Krisztina – Kisgyőr

Bonvolu akcepti iom da refreŝigaĵo.
Jen, la

Oranĝa kafo

La kafon mi pretigas el forte perkeltaj afrikaj (permane kolektitaj) kaf-faboj tiel, ke sur la freŝe muelitan kafon mi gutumas kelkajn gutojn da oranĝ-likvoro, aŭ da oranĝ-aromo aŭ sukon de duono da kruda oranĝo antaŭ la kuirado. Poste mi ekkuiras la kafon. Al la kuirado mi uzas tn. kafpremilon kaj etilalkoholhavan kandelfajron. Tiel mi povas rigardi la malrapide subiĝantajn kaferetojn.

Kiam ni altablighas ĝin; mi ornamas ĝian supron per raspita amara ĉokolado (nigra ĉokolado) kremŝaŭmo kaj raspita ŝelo de oranĝo.

Esperantigis: Adrienne, s-rino Pásztor

Szabó Lőrinc Dubrovnikban

Miskolc város önkormányzata, a Miskolci Egyetem Szabó Lőrinc Alapítványa és a Zágrábi Egyetem Bölcsészettudományi Karának Hungarológiai Tanszéke Szabó Lőrinc emléktáblát avatott Dubrovnikban 2007. április 20-án a miskolci születésű magyar költő emlékére.

Miskolc szülőtte többször járt Dubrovnikban, ott írta az Egy raguzai leanderhez, a Lóci és a szakadék, valamint a Beszélgetés a tengerrel - mű verseit is.

Az emléktáblát Policsányi István szobrászművész készítette.

(ÉM. 2007. IV. 20)

Szabó Lőrinc

DSUANG DSZI ÁLMA

Kétezer évvel ezelőtt Dsuang Dszi,
la mester, egy lepkére mutatott.
- Álmomba - mondta, - ez a lepke voltam
és most egy kicsit zavarban vagyok.

- Lepke, - mesélte, - igen, lepke voltam,
s a lepke vígan táncolt a napon,
és nem is sejtette, hogy ő Dsuang Dszi ...
És felébredtem ... és most nem tudom,

most nem tudom, - folytatta eltűnődve, -
mi az igazság, melyik lehetek:
hogyan Dsuang Dszi álmodta-e a lepkét
vagy a lepke álmodik engemet? -

Én jót nevettem: - Ne tréfálj, Dsuang Dszi!
Ki volnál? Te vagy Dsuang Dszi! Te hát! -
ő mosolygott: - Az álombeli lepke
épp így hitte a maga igazát! -

Ő mosolygott, én vállat vontam. Aztán
valami mégis megborzongatott,
kétezer évig töprengtem azóta,
de egyre bizonytalanabb vagyok,

és mostmár azt hiszem, hogy nincs igazság,
már azt, hogy minden kép és költemény,
azt, hogy Dsuang Dszi álmodja a lepkét,
a lepke őt és mindhármat én.

(A Küldő: Csiszár Ada – Kalocsay Társaság Budapest)

Laŭrenco Szabó, la poeto en Dubrovnik

La urba registaro de Miskolc, la Fonduso Laŭrenco Szabó de la Miŝkolca Universitato kaj la Hungarologia Katedro de la Filologscienca Fakultato de la Zagrabia Universitato inaŭguris memortabulon la 20-an de aprilo en 2007, je memoro de la en Miskolc naskiĝinta poeto. La en Miskolc naskiĝintulo plurfoje estis vizitanto en Dubrovnik, tie li skribis ankaŭ la poemojn siajn: Al iu oleandro de Raguza, Lóci kaj la rokfendo, kaj la Babilado per la maro. La memortabulon kreis la skulptoartisto István Policsányi.

(El la 20. 04. 2007-a gazeto Északmagyarország, esperantigis: Adrienne, s-rino Pásztor)

Laŭrenco Szabó

SONĜO DE ĜUANG DZI

Jam antaŭ du mil jaroj ĜUANG DZI
la majstro, montris papilion. - Songe
li diris - mi 'stis tiu papilio,
kaj nun min embaraso ĝenas ronĝe.

Jes, papilio mi 'stis, papilio,
kiu dancis gaje sub la sun',
sen konjektet' ke ĝi 'stas Ĝuang Dzi,
kaj mi vekiĝis, kaj ne scias nun,

ne scias nun - revante li daŭrigis -
kio la vero, kiu estas mi:
ĉu Ĝuang Dzi la papilion songis,
aŭ min nun songas tiu papili'?

Mi ridis ege: - Ej, Ĝuang Dzi, ne serĉu,
kiu vi 'stus? Vi 'stas Ĝuang Dzi.
Ridetis li: - La papili' songanta
ja kredis, ke la vera estas ĝi.

Ridetis li, mi ŝultrotiris. Poste
min frostotremigis tamen ia tim':
de tiam mi meditis du mil jarojn
kaj pli kaj pli jam dubas la anim',

mi kredas jam, ke ne ekzistas vero,
ĉio 'stas nur imago kaj poem',
kaj Ĝuang Dzi la papilion songas,
ĝi lin kaj nin ĉiujn tri mi mem.

(El la postlasaĵo. Trad. de K. Kalocsay – sendinto: Ada Csiszár;
Kalocsy-Societo Budapeŝto)

Utazni, jó!

Ugye, Önök is szeretnek?

Ajánlatunk: tekintsek meg dr. Ferenczy Imre írását az Inter City vonatokról.

Dr. Ferenczy Imre Magyarország vonatai

Az utóbbi húsz évben, főleg Németországban a belföldön közlekedő, valamint a külföldre induló és onnan érkező Eurocity és Intercity vonatokat a számjelzés mellett még érdekes névvel is ellátják. Jónéhány éve a magyar vasútvonalakon is már szép számmal találunk nevet viselő vonatokat. Az alábbi összeállítás nem teljes, csak a legfontosabb és legérdekesebb adatokat tartalmazza. Leginkább folyók, zeneszerzők, országrészek, hegyek és híres emberek nevével találkozunk a MÁV Hivatalos 2006-2007-évi Menetrendkönyvében a vonatok böngészése közben.

A "*Tisza expressz*" nemzetközi gyorsként Budapest és Moszkva között közlekedik (2106 km.). A Tisza hazánk második legnagyobb folyója, a teljes hossz 977 km, ebből a magyar szakasz 579 kilométer. Máramarosnál ered és Titelnél ömlik a Dunába. A "*Latorca*" nevű IC vonat Budapest és Csap között jár (341 km). Budapest Nyugati pu-ról 15.20-kor indul és 21.15-kor érkezik Csapra. A folyó a Vereckei-hágó közelében ered, hossza 188 km. Munkács város folyójaként is említik. A Tisza legnagyobb baloldali mellékfolyója a "*Maros*". E néven Budapest és Marosvásárhely között jár a nemzetközi gyors. A menetidő mintegy 10 óra, a távolság 587 km. A Gyergyói havasokban eredő folyó teljes hossza 880 km, Nagylaknál lép be Magyarországra és Szeged fölött ömlik a Tiszába. A magyar szakasz hossza 49 km.

Ugyancsak nemzetközi gyorsként közlekedik a "*Szamos*" nevű vonat Püspökladány és Szatmárnémeti között, de a vonat közvetlen kocsikat is közlekedtet Budapestre és Budapestről. A Szamos folyó 411 kilométeréből 346 km. Románia területére esik, és Vásárosnaménynál ömlik a Tiszába. A "*Kőrös*" IC Budapest és Temesvár között teremt közvetlen vasúti összeköttetést. A Kőrös egy folyórendszer alkotó öt folyó neve, Csongrádnál ömlik a Tiszába. A "*Mura*" IC csak a nyári forgalomban közlekedik Budapest és

Nagykanizsa között. A Mura a Dráva mellékfolyója, Ausztriában ered, 438 kilométer hosszú, határfolyónk a déli országrészen 40 km. hosszban.

A "*Lehár*" EC vonat Budapest Keleti pu-ról 19.10-kor indul és 3 óra alatt teszi meg a 263 km. távolságot.. Lehár Ferenc (1870-1948) világhírű zeneszerző, főként Ausztriában élt és az operett műfaj kiváló művelője lett. Legismertebb operettjei: "Mosoly országa", "Luxemburg grófja", "Cigányszerelem". A "*Liszt Ferenc*" EC vonat szintén a magyar és osztrák főváros között közlekedik. Liszt Ferenc (1811-1886) kora legkiválóbb zongoraművésze és egyik legjobb zeneszerzője volt. Sopronban és Pozsonyban lépett fel először 9 éves korában. Bécsben tanult. A "*Kálmán Imre*" éjszakai nemzetközi vonat Budapest és München között jár. Kálmán Imre (1882-1953) híres operettszerző volt, művei közül legismertebbek: "Csárdáskirálynő", "Tatárjárás", "Marica grófnő". Nemzetközi gyorsvonat a "*Rákóczi*" is. Budapest és Kassa között jár. Jó csatlakozás van innen tovább a Magas Tátra felé. II. Rákóczi Ferenc (1676-1735) a magyar történelem kimagasló alakja, a szabadságharc vezetője és erdélyi fejedelem volt. "*Ady Endre*" nevét viseli egy nemzetközi vonat Budapest és Kolozsvár között. A vonat Budapestről 13.15-kor indul és este 21.30-kor érkezik a Cluj-Napoca (Kolozsvár) állomásra.. Ady Endre (1877-1919) legnagyobb költőink egyike tanulmányai után hírlapíró lett Nagyváradon. Belföldi IC vonat a "*Claudius*" Budapest és Szombathely között. Claudius római császár nevéhez fűződik a vasi főváros (Colonia Claudia-Savaria) megalapítása. Alakját és korát a neves angol író, R.Graves ábrázolja két regényében: "Én Claudius" és "Claudius az "Isten" címen.

Virágok nevével is találkozhatunk a vonatok között kutatva. A "*Jázmin*" IC belföldi vonat Budapest Keleti pályaudvarról indul, majd Miskolc-Nyiregyháza-Debrecen útvonalon tér vissza a Nyugati pályaudvarra. A jázmin illatos virágait már az ókorban is és azóta is használják illatszerként. A vallási szertartásokon földre hintették, vagy fürdővízbe szórták. A kertekben számos jázminfajt természetnek és a fajtáknak sokféle változata létezik. A Budapest és Sopron közötti forgalomban jár a "*Ciklámen*" IC. A ciklámen főleg magas hegységek nedves, árnyas helyein tenyésző, illatos, lila színű vadvirág. A Soproni hegyekben és a Lővérekben is megtalálható ez a szép virág.

A neves épületek sorában a magyar főváros két IC vonattal szerepel. A "*Citadella*" Budapestről a szlovén fővárosba, Ljubljánába viszi utasait, a másik vonat a "*Halászbástya*" Budapest és Graz között jár. A citadella olasz szó, fellegrárat jelent. A Citadella a Gellért-

hegy tetején fekvő, az 1848-49-es szabadságharc leverése után épített erőd, fontos idegenforgalmi látnivaló. A Halászbástya Budapest egyik legismertebb műemléke a budai várban. Tornyaiból, teraszairól nagyszerű kilátás nyílik a Dunára, a Margitszigetre, a pesti oldalra és a Gellért-hegyre is.

Végül egy érdekes vonatnév a "*Kékfrankos*" mely Sopron és Győr között közlekedő belföldi IC vonat. Sopron híres borvidékén a legismertebb, tanninban gazdag száraz vörösbor a kékfrankos. Soproni hagyomány, hogy a nevét a Napóleon seregében szolgáló katonák pénzéről kapta. A jobb borokat ugyanis a helyi gazdák csak az értékesebb kék színű régi francia papírpénzért mérték a katonáknak.

Vojaĝi estas bona!

Ĉu ankaŭ Vi ŝatas?

Ni proponas, bonvolu rigardi la I.C. trajnojn laŭ verko de

D-ro Imre Ferenczy
Trajnoj de Hungario

En la lastaj dudek jaroj ĉefe en Germanio oni provizis la enlandajn kaja al eksterlando trafikantaj IC kaj EC trajnojn per interesaj nomoj krom la trajnonumeroj. Ekde kelkaj jaroj ankaŭ sur la hungaraj fervojlinioj abunde ni trovas trajnojn, kiuj portas nomon. La suba kompilaĵo ne estas kompleta, ĝi enhavas nur la plej gravajn kaj interesajn indikojn. Precipe ni renkontiĝas kun nomoj de riveroj, komponistoj, landpartoj, montoj kaj famuloj en la oficiala horarlibro de MÁV eldonita por la jaroj 2006/2007 dum la serĉado de la trajnoj.

La ekspreso "*Tisza*" (Tibisko) kiel rapidtrajno trafikas inter Budapeŝto kaj Moskvo (2106 km). Tisza estas la dua plej granda rivero de nia lando, la tuta longeco estas 977 kilometroj, el ĉi tiu la hungara etapo 579 km. Ĝi fontas ĉe Máramaros kaj enfluas Danubon en Titel. La IC trajno "*Latorca*" iras inter Budapeŝto kaj Csap (Čop). Ĝi ekiras el la Nyugati (Okcidenta Stacidomo) je la 15.20-a kaj alvenas al Csap je la 21.15-a. La rivero fontas proksime de la montpasejo Vereckei, ĝia longeco estas 188 km. Oni mencias ĝin rivero de urbo Munkács. "*Maros*" (Maroŝ) estas la plej granda maldekstra flankrivero de Tisza. Sub ĉi tiu nomo trafikas la internacia trajno inter Budapeŝto kaj Marosvásárhely (Tirgu Mureș). La veturdaŭro estas 10 horoj. La tuta longeco de la rivero fontanta en la altmontaro Gyergyói

estas 880 km, eniras Hungarion ĉe vilaĝo Nagylak kaj alfluas al Tisza ĉe urbo Szeged (Seged). La longeco de la hungara etapo estas 49 km.

Same kiel internacia trajno la "*Szamos*" (Samoŝ) trafikas inter Püspökladány kaj Szatmárnémeti (rumane: Satu Mare), sed la trajno portas ankaŭ rektajn vagonojn al kaj de Budapeŝto. El la 411 kilometroj de la rivero Szamos 346 kilometroj apartenas al Rumanio kaj ĉe Vásárosnamény enfluas la riveron Tisza. La IC "*Kőrös*" faras rektan kontakton inter Budapeŝto kaj Temesvár (Timiŝoara). Kőrös estas nomo de kvin riveroj kreantaj riversistemon, ĝi alfluas al Tisza ĉe urbo Csongrád (Ĉongrad). Nur en la somera periodo trafikas la IC "*Mura*" inter Budapeŝto kaj Nagykanizsa. La rivero Mura estas la flankrivero de Dráva, fontas en Aŭstrio, nia apudlima rivero en longeco de 40 kilometroj sur la suda landparto.

La EC trajno "*Lehár*" ekiras el la Orienta stacidomo de Budapeŝto je la 19.10-a kaj dum tri horoj venkas la distancon de 263 kilometroj. Ferenc (Francisko) Lehár (1870 - 1948) la mondfama komponisto vivis grandparte en Aŭstrio kaj iĝis eminentulo de la genro de opereto. Liaj plej konataj operetoj estas: "La lando de la rideto"; "La Grafo de Luksemburgo"; "Cigana amo". Ankaŭ la EC trajno "*Ferenc Liszt*" trafikas inter la hungara kaj aŭstra ĉefurboj. Ferenc Liszt (1811 - 1886) estis la plej elstara pianartisto de sia epoko kaj unu el la plej bonaj komponistoj. Unue en sia 9-a jaro li debutis en urboj Sopron kaj Pozsony (Bratislava), studis en Vieno. La nokta trajno "*Imre Kálmán*" trafikas inter Budapeŝto kaj Munkeno (München). Imre Kálmán (1882 - 1953) estis fama komponisto, el siaj verkoj la plej konataj: "Ĉardaŝreĝino"; "Tatara invado"; "Grafino Marica". Internacia trajno estas ankaŭ la "*Rákóczi*". Ĝi faras ligon inter Budapeŝto kaj Kassa (Koŝice). Plu de ĉi tie estas bona konekso al la Altaj Tatroj. Ferenc Rákóczi la II-a (1676 - 1735) elstara figuro de la hungara historio estis la gvidanto de la liberecbatalo kaj princo de Transilvanio. La nomon de "*Endre Ady*" portas internacia trajno inter Budapeŝto kaj Kolozsvár (Cluj). La trajno ekiras el Budapeŝto je la 15.15-a kaj vespere je la 21.30-a alvenas al stacidomo Cluj-Napoca. Endre Ady (1877 - 1919) unu el niaj plej grandaj poetoj iĝis ĵurnalisto en urbo Nagyvárad (Oradea) post siaj studoj. Enlanda trajno estas la "*Claudius*" inter Budapeŝto kaj Szombathely. Al la nomo de la romia imperiestro Claudius ligiĝas la fondo de la ĉefurbo Vas-Departemento (Colonia Claudia-Savaria). Lian figuron kaj epokon la angla verkisto R. Graves prezentas en siaj du romanoj: "Mi, Claudius" kaj "Claudius, la Dio".

Ankaŭ nomojn de floroj ni povas trovi serĉante inter la trajnoj. La enlanda IC trajno "*Jázmin*" (Jasmeno) ekiras el la Orienta stacidomo de Budapeŝto kaj uzante la fervojlinion Miskolc-Nyíregyháza-Debrecen revenas al la Okcidenta stacidomo. La bonodorajn florojn de jasmeno oni konis jam en la antikva epoko kaj uzas ekde tiu tempo kiel parfumaĵon. Kadre de la religiaj ritoj oni disŝutis ĝin sur la teron, aŭ metis en banakvon. En la ĝardenoj oni produktas plurajn jasmenspecojn kaj ekzistas multaj variantoj el ili. En la trafiko de urboj Győr kaj Sopron (Ŝopron) estas trovebla la IC trajno "*Ciklámen*". La ciklameno estas bonodora, violkolora, nekulturita floro kreskanta sur la malsekaj ombraj lokoj ĉefe de altaj montoj. Ankaŭ sur la montoj de Sopron kaj en la tieaj Lővérek troviĝas tiu ĉi bela floro.

En la vico de la famaj konstruaĵoj de la hungara ĉefurbo oni vidas du IC trajnojn. La "*Citadella*" portas siajn pasaĝerojn el Budapeŝto al la slovena ĉefurbo, Ljubljana, la alia trajno la "*Halászbástya*" (Fiŝkaptista Bastiono) trafikas inter Budapeŝto kaj Graz. La citadelo estas itala vorto kaj signifas fortikaĵon, ĉe la grekoj akropolon. Ĝi estas fortikaĵo konstruita post la subpremo de la liberecbatalo de la 1848-49-aj jaroj, grava fremdultrafika vidindaĵo. La Fiŝkaptista Bastiono estas unu el la plej konataj artaĵoj en la fortikaĵo de Buda. El ĝiaj turoj, terasoj grandioza panoramo etendiĝas al la Danubo, Margaretinsulo, al la urboparto Pest kaj ankaŭ al la monto Gellért.

Fine unu interesa trajnonomo: "Kékfrankos", enlanda trajno trafikanta inter Győr kaj Sopron. Kékfrankos estas Ŝopron-regiona seka, ruĝa vino taninon abunde enhavanta. Ekzistas onidiroj el Sopron, ke la vino ricevis sian nomon pro la mono de la soldatoj servantaj en la armeo de Napoleon. La pli kvalitajn vinojn la lokaj vinkomercistoj vendis nur kontraŭ la pli valoraj, blukoloraj monbiletoj francaj al la soldatoj.



A magyar IC vonat / La hungara IC trajno

Poemo omaĝe al la Tero

Angelo Armani / Dave Horrow

ESPERANTO

Amour, gloire, paix et joie
Dans nos âmes et nos coeurs
Les oiseaux du bonheur
Apporteront l'espoir
D'un monde meilleur
Sur la Terre.

Am', glor', pac' kaj ĝoj'
En niaj anim' kaj kor'
La birdoj de feliĉ'
Alportos la esper'
De mond' pli bona
Sur la Ter'.

Une pluie d'étoiles dans le ciel
Un regard éternel
Le chant de l'harmonie
Un sourire à la vie
La main d'un enfant
Pur et innocent
Vérité
Unité
Liberté.

Pluvo de steloj en la ĉiel'
Eterna rigardo
La kant' de l' harmoni'
Rideto al la viv'
La man' de infan'
Pura kaj senkulpa
Verec'
Unuec'
Liberec'.

Amour, gloire, paix et joie
Dans nos âmes et nos coeurs
Les oiseaux du bonheur
Apporteront l'espoir
D'un monde meilleur
Sur la Terre.

Am', glor', pac' kaj ĝoj'
En niaj anim' kaj kor'
La birdoj de l' felic'
Alportos la esper'
De mond' pli bona
Sur la Ter'.

Du royaume de lumière
Reflet de l'Univers
La colombe de la paix
S'envolera vers des cieux
Où l'amour est loi

De la reĝlando de lum'
Rebril' de l' Univers'
La kolombo de la pac'
Ekflugos al la ĉielo
Kie am' estas leĝ'

C'est pour demain

Le rameau

D'olivier

Liberté

'stas por morgaŭ

La branĉet'

L'olivuj'

Liberec'.

Un paradis sur la terre

La gloire pour l'univers.

Paradizo sur la ter'

La glor' por l' Univers'.

Message d'amour pour nos enfants

Espérance.

Ammesaĝo por nia infan'

Esperemo.

(Junio, 2006.- Sendinto: Tibor Szabadi)



Ada Sikorska Fighiera

Ada Sikorska Fighiera

Karaj niaj legantoj!

Jen, la lasta epizodo de vivo de sinjorino Ada Sikorska Fighiera,

Priskribitaj de

G. C. Fighiera

La lastaj tagoj de Ada, Aduška

- daŭrigo -

Metastazo!

En la kliniko, post la radiografiado ni sidis en atendo-salono. Iom poste kuracisto vokis min en la laboratorion kaj montris al mi kontraŭlume la negativajn bildojn, ĉe kiuj videblis multaj blankaj punktoj, koncentritaj ĉefe ĉe la hepato kaj laŭlonge de la spino, plej intense ĉe nuko kaj sakro. La verdikto estis metastazo, alivorte ĝeneraligita kancero, la plej fatala el ĉiuj malsanoj! Ŝanceliĝante sub la bato, mi revenis al Ada kaj penante normaligi mian voĉon, kun nodo en la gorĝo rakontis al ŝi, ke la doktoro konfirmis ostoporozon. Mia unua mensogo, ripetota dum du monatoj!

La venontan tagon, je ricevo de la tutaĝa radiografia skriba raporto, kiel promesite mi telefonis al la antaŭa specialisto. Sufiĉis al li la unua paragrafo, por kompreni pri kio temas; li interrompis min, dirante; „Mi urĝe rezervos lokon por ŝi en mia malsanulejo; akompanu vian edzinon tien morgaŭ matene je la 8-a h.” La informo pri enhospitaliĝo ne maltrankviligis Ada: ŝi eble iel ĝojis, ke finfine ŝi troviĝos en la ĝusta loko por forigi la suferojn.

Temis pri unu el la Torinaj grandaj publikaj hospitaloj, nomata mallonge CRT, specialigita pri ostaj traŭmoj. Bedaŭrinde, estis sabato; semajnfine la servoj lamis tie, la koncerna specialisto forestis kaj la deĵorantaj kuracistoj ne multon sciis pri ŝia kazo; ĉef-flegisto ricevis instrukciojn apliki al ŝi kontraŭdoloran terapion, sed la dozoj verŝajne neplene sufiĉis, ĉar inter du injektoj la doloro forte revenis. London frumatene mi renkontis la specialiston kaj ni interkonsentis ŝian transporton al privata kliniko.

Komence de junio 1996. Kiel dirite en la unuaj linioj, Ada eniris en la kuracejon kor-malpeze. En la akompana valizeto troviĝis duvoluma verko (po 500 paĝoj) pri pola historio kaj multe da leter-papero. La kliniko, Fornaca, situis en la koro de la urbo kaj ŝajnis grupo da elegantaj vilaoj meze de altaj arboj kaj verdaj herbejoj: trafik-bruo ne atingis la pavilonojn.

Ada ricevis propran ĉambron kun banejo kaj alrigardo al eksteraj arboj: pli ol malsanulejo la aranĝo similis al kelk-stela hoteleto. La ĉambro disponis pri modulebla klimatizo, tele-reguleblaj radio kaj kolor-televido, telefono, mult-provianta glaci-ŝranko, ortopedia lito, kies kliniĝon la paciento povis laŭvole mem modifi per ĉemana klavo, apuda sonorilo por alvoki flegistinojn kaj aldona sofo-lito, sen paroli pri kamero kunligita al tag-nokta kuracista observejo. La manĝoj estis elekteleblaj el longa menuo, kun mencio, ke ankaŭ aliaj pladoj estis kuirotaj laŭ dezir-esprimo. La asekur-kompanio ricevis la necesajn kuracistajn atestaĵojn kaj akceptis transpreni ĉiujn kostojn.

En la unuaj tagoj sinsekvis rutinaj ĝeneralaj esploroj, surbaze de kiuj strukturiĝos la terapio. Mi kunvenis kun la antaŭa specialisto kaj kun pli maljuna klinika ĉefkuracisto; ili jam studis ŝiajn radiografiojn. Fake, sed homece, ili sciigis al mi, ke la vivo de Ada troviĝas en la fina stadio. Mi ne memoras, kiel mi trovis la forton demandi pri la esperebla restanta tempo: unu respondis diplomate „ne longe”, la alia aldonis krude „eble du monatojn”. Montriĝos, ke li pravis. Mi esprimis jenan volon: „Faru kion ajn vi volas, sed ŝi ne plu devas suferi”. La volo estis honeste plenumita, kiel rakontos la subaj linioj

La sola, kiu ignoris la gravecon de la malsano estis Ada. Mi petis la hospitalan personaron nur kun mi paroli pri ŝia sanstato kaj neniam menciis antaŭ ŝi, ke temas pri kancero. Verdire, la kuracistoj neniam mensogis al ŝi; ili simple silentis la nomon de la malsano kaj eldiris ĝeneralajn opiniojn, kiel „necesas plifortigi la ostojn” kaj simile. Ada eĉ ne pridemandis ilin, sed restis en la konvinko, ke temas pri la pli frue diagnozita ostoporozo; pli ol esperon, ŝi havis certecon saniĝi.

Kiel ofte en Italio, la kliniko apartenis al katolika fondaĵo: apud laikaj flegistinoj deĵoris en ĝi Karmelaj fratinoj, kiuj havas tre aaltan profesian reputacion en la lando: la italoj asertas, ke kie laboras monakinoj, ĉio funkcias pli bone. Vere, la flegado estis perfekta: multfoje dum la tago kaj unufoje dum la nokto Ada ricevis viziton de la ĉefkuracisto kaj de liaj kunlaborantoj, dum la flegistinoj konstante venadis por fleboklizadoj, por doni aŭ injekti plej diversajn medikamentojn, por kontroli la fundamentajn san-indicojn, aŭ simple por amika konversacio, kio tre gravas por paciento. Se iufoje ŝi perceptis revenon de la doloro, sufiĉis sonori kaj flegistino tuj aplikis specialan injekton kun fulm-rapida efiko. Kredeble, Ada estis plen-ŝtopita per ĉiaspekaj kontraŭdoloraj drogoj, sed tio neniam minacis ŝian lucidecon, male!

Konante ŝian societeman naturon, sendepende de la klinika personaro, mi dungis du eksterajn flegistinojn por havigi al Ada konstantan kompanion: la tag-nokto estis dividita en tri partojn: matene, unu el la diritaj helpantinoj sidis ĉe Ada dum mi daŭrigis hejme ŝian gazetan laboron; posttagmeze mi mem restis apud ŝi, nokte deĵoris alia helpantino. Tiamaniere, en kiu ajn momento ŝi malfermis la okulojn, ŝi trovis homojn apud si: kiu ajn deziro estis tuj kontentigita. La aranĝo tiom plaĉis al Ada, ke ŝi spontane amikiĝis kun la deĵorantinoj. Aliflanke, dum la tuta kurac-periodo, ŝia moralo restis alta; precipe en la unuaj semajnoj ŝi volonte ŝercis. Kiam la kuracistoj ordonis, ke ŝi surmetu ortopedian rigidan kol-ringon, kiam ŝi devis forlasi la liton (kaj tion povis fari nur pene apogante sin al helpanto), ŝi komentis: ”Nun, kun tiu ĉi kol-ringo mi similas al la hundo Pluto de Walt Disney!” Al mia

diskreta esploro, ĉu ŝi volas, ke vizitu ŝin la fratino loĝanta en la apuda Svisio, ŝi respondis, ke nur al mortantoj oni venigas la parencojn. Tiuj verismaj vortoj mutigis min.

Komence, Ada ektransformis la hospitalan ĉambron en la apendicon de sia ĉiutaga vivo. Ŝi petis, ke mi alportu la de ŝi preferatajn objektojn – ekz. la akran kuirejan tranĉileton, la malgrandan kuseneton, sen kiu ŝi ne kapablus dormi, la german-tipan panon aĉeteblan en speciala bakejo, ĉiujn kosmetikaĵojn, la daŭre alvenantan korespondaĵon de Heroldo. Necesas klarigi, ke en 1996 telefakso estis malpli uzata ol nuntempe kaj ke elektronika poŝto ne ekzistis; pro tio komunikado okazis grandparte perpapere: Heroldo ricevis ĉiutage grandan faskon da leteroj, gazetoj kaj bultenoj. Krom la analizo de tiu ĉi materialo, ŝia ŝatokupo estis korespondadi. Fine de ĉiu tago mi forportis el la kliniko la ekspedotan leteraron, kiun ŝi, sidante en la lito, skribis al geamikoj ĉie en la mondo por informi ilin pri sia sanstato, rendevui ĝis la baldaŭa Universala Kongreso aŭ en Pollando kie ŝi intencis libertempi post unu monato, antaŭ la kongreso. Eblas kalkuli, ke preskaŭ 100 ŝiaj leteroj (unu el ili estas ĉi tie aldonita) kaj poŝtkartoj direktiĝis al diversaj anguloj de la mondo.

Pietisme mi gardas la grafikajn tabelojn de ŝi skizitajn en la lito en la unua monato: ili koncernis la sopiratan vojaĝon al Varsovio. De tempo al tempo, Ada prenis folion, desegnis sur ĝin kruciĝantajn horizontalajn kaj vertikalajn liniojn, kreante ian kalendaron, en kies tagojn ŝi enskribis la celitajn planojn: renkonti konatulojn, viziti geamikojn, festi naskiĝ-aŭ nom-tagojn, telefoni al iama kolego aŭ al abonanto, viziti libro-vendejon, spekti operon, ktp. Unu el tiuj kortuŝaj surpaperaj revoj estas aldonita.

Ŝiaj polecaj sentoj eksteriĝis pli kaj pli. Ada tiom impresis la ĉefkuraciston per siaj klarigoj pri historio de Pollando – pri la grandeco de kelkaj reĝoj (kaj de la ŝatata reĝino Bona) ĝis la perdo de la landa libereco-, ke li venigis amikon profesoron pri historio en la Torina universitato por diskuti kun ŝi pri pola historio.

Dum tri semajnoj estis al ŝi aplikata radiumado: per tio oni intencis nuligi la riskon, ke la kancero progresu al la cerbo kaj damaĝu ĝin. Al Ada estis klarigite, ke la radiumado plifortigos la ostojn, kio estis nur parto de la vero. La koncernaj aplikoj okazis en alia kliniko, al kiu ŝi estis transportita per 20-minuta ambulanc-veturado. Ŝi akceptis la situacion kun la kutima pozitiva sinteno: plaĉis al ŝi havi okazon por foriri el la malsanulejo, trairi grandajn bulvarojn kaj iom rigardi tra fenestro la altajn verdajn arbojn de la junia monato.

Por eviti, tro lacigi ŝin, mi fiksis por la tagaj, vizitoj jenan principon: ne pli ol unu vizito en la dua posttagmezo dum ne pli ol ĉ.20 minutoj: neniuj vizitoj dimanĉe. Se floroj, ili prefere estu blankaj kaj ruĝaj. Baldaŭ ŝia kuŝ-ĉambro pleniĝis per diversspecaj flor-bukedoj blank-ruĝaj: mi rimarkigis al ŝi, ke ĉiuj volis omaĝi ŝin per la koloroj de Pollando. Tio feliĉigis ŝin. Antaŭ ĉiu vizito, ŝi nepre deziris aspekti en bona ordo: petis spegulon, retuŝis la ŝminkon kaj surmetis freŝe kombitan arteferitan hararon. Detale memprizorgo estis esenca parto de ŝia ekzisto; ĝis malmultaj tagoj antaŭ la forpaso, matene kaj vespere post akurata tualetado Ada ŝmiris respektive tagan kaj noktan kosmetikan kremon por konservi sanan haŭton.

En la unuaj tempoj, Ada nutris sin tiom kiom kutime, nome malmulte: la prizorgantinoj nur ricevis peton, prezenti en la telero duonon porcion, ĉar la rigardo de tro abunda manĝo naŭzis ŝin. Kun la evoluo de la semajnoj, ŝi manĝis malpli kaj malpli ĝis alveni al kompleta rifuzo sin nutri, kiel ni baldaŭ vidos.

Intertempe, forpasis la unua monato; la daŭrigan konfirmon de la asekura interveno subite haltis pro konflikto inter la Milana asekur- kompanjo kaj la Torina hospitala ĉef-kuracisto. La kompanjo nun postulis la tutan klinikan tag-dosieron de la pacientino, sed la kuracisto limiĝis al manskribita raporto, kiun la asekuristoj konsideris nesufiĉa. Jam, la hospitalo sciigis, ke Ada devas iri al ĝenerala malsanulejo, ĉar la leĝo pri defendo de privateco malpermesas doni al eksteruloj personan dosieron. Bonŝance, mi trovis kompromison: oni donu la dosieron ne al la kompanio, se al mi, kiel edzo: tio okazis; mi fotokopiis kaj sendis ĉion al la asekur-entrepreno, kiu tuj plilongigis sian pag-garantion. Ada sekvis la batalon plej trankvile kaj skribis al amikino en Kanado leteron, kiun la ricevinto havigis al mi post ŝia morto: "En malbonaj momentoj Gian Carlo estas unika". La plej belaj vortoj, kiujn mi ricevis dum la tuta vivo!

Kvankam la radiumado postlasis senhaltan abundan salivumadon, kiun ŝi daŭre devis forpreni per paperaj tukoj, la doktoroj taksis la rezulton tre kuraĝiga: la progreso de la malsano al la cerba zono ŝajnis blokita. La bazaj fart-indicoj (sangopremo, kolesterolo, ktp.) eĉ pliboniĝis, eble pro la ripozo en la malsanulejo. Febron ŝi neniam havis. Preskaŭ ĉiutage, kiam ŝi sentis sin sufiĉe forta, ŝi estis sidigita en remburita (pro la doloro ĉe la sakro) rul-seĝo kaj veturigita de flegistinoj aŭ mi tra la klinikaj koridoroj al ekstera teraso, kiu aspektis kiel surstrata kafejo kun komfortaj foteloj kaj kontraŭsunaj ombrelegoj. De tie ŝi povis rigardi la ĉirkaŭantajn arbojn kaj la vivon en unu el la urbaj ĉef-bulvaroj. Sed, kia peniga spektaklo vidi tiel vivoplenan virinon senpova sur rulseĝo! Ŝia imago-povo estis tiel forta, ke ofte je mia eniro en ŝian ĉambron, ŝi diris: "Mi aŭdis vin alproksimiĝi": tio ne eblis, ĉar la koridoron kovris tapiŝoj kaj miaj ŝuoj surhavis kaŭĉukajn plandojn. Ĉiutage, iomete malferminte la pordon, mi povis tuj vidi ŝin kaj samtempe legi en ŝia mieno, pli bone ol kiu ajn doktoro, kiel ŝi momente fartis. Mi vokis ŝin „Aduŝka!", la poleca karesnomo de mi elpensita, pri kiu ŝi aparte fieris.

La korpo de Ada ĝis tiam pozitive reagis ĉe esploroj. La hepato ne doloris, kiam la kuracistoj palpis ĝin (sed ili klarigis al mi, ke ĝi estas malmola kiel ŝttono). Malgraŭ la ŝajnaj pliboniĝoj tipaj ĉe tiaj malsanoj, la komenca kuracista prognozo pri fatala eliro ne ŝanĝiĝis. Aliflanke, sentante sin pli bonfarta, Ada ekinsistis por rehejmiĝi, kiun la kuracistoj malpermesis, klarigante, ke se tiu okazus, ŝi revenus al la kliniko du semajnoj poste en pli malbona stato. Krome, ili anoncis al ŝi, ke ŝi ne povos veturi al Pollando kaj al la Kongreso. Je tio, ŝi dum sekundoj plor-singultis, sed tre rapide denove regis sin kaj kvazaŭ pardonpete pro la momenta malforto, konfesis: "Mi ne estas histeria!". (En „De tajgo al minaretoj", rakontante pri la unua trista kristnaska festo de la polaj infanoj en Siberio, ŝi skribis, ke ĉiuj partoprenantoj angore pensis pri la malproksimaj familianoj kaj pri la patroj en milito, sed neniuj ploris, „ĉar poloj devas esti fortaj!") En alia momento Ada montriĝis pli forta ol mi, kiam ŝi kaptis min kaŝe ploranta kaj diris: "Ne ploru, Ĝiankarleto, alie ankaŭ mi ploros!". Ankoraŭ nun frapas min la absurdo de la situacio: ŝi, mortonta, kuraĝigis nin, ne inverse!

Alian fojon ŝi kortuŝiĝis: en la unuaj semajnoj de la enhospitaliĝo juna torina esperantistino raportas al ŝi, ke la junul-grupo amatores ludis en Torino teatraĵeton kaj dediĉis la aplaŭdojn al ŝia resaniĝo. Mallonge, ŝi eksingultis kaj poste diris: "Mi ploras pro ĝojo".

Por mildigi la kuracistan neon de vojaĝado, mi konvinkis Ada-n, ke la veturado al Pollando nur prokrastiĝos ĝis jarfino. Trankviligis ŝin ankaŭ la fakto, ke Spomenka Stimec telefaksos ĉiutage el Prago UK la materialon por la duobla kongresa numero, kiun mi fin-redaktos hejme. Malgraŭ tio, Ada intencis mem enpaĝigi la gazeton kaj insistis por ke mi alportu al ŝi la necesan bazan ŝablonon. Malmultaj semajnoj antaŭ ŝia morto, en la hospitala lito ŝi komencis, sed ne havis la forton fini, du artikolojn: la unua klarigis al la legantoj la kondiĉojn de la

gazeta transdono; la lasta, titolita „Ĉeno de solidareco” (aneksita al la nuna kajero), dankis la spontanajn kunlaborantojn, kiuj sendis la kongresajn raportojn el Prago.

La transdono de la gazeto

En la lastaj semajnoj aperis en Torino Valerio Ari, bona literaturisto, kiun Ada kaj mi kelkfoje gastigis kaj invitis prelegi en la loka Esperanto-societo. Kiam li eksciis pri la nekuracebla malsano, li deklaris sin preta transpreni la eldonadon de la gazeto ekde la venonta januaro 1997: li havis sperton pri redaktado de Esperanto-gazeto. Mi volis, ke Ada mem decidu pri la transdono kvazaŭ okazonta post „ŝia resaniĝo”.

En aliaj cirkonstancoj Ada rifuzus la proponon, ĉar ŝi intencis resti en sia posteno dum almenaŭ du pliaj jaroj, por atingi la same longan redaktoran daŭron de la fondinto de Heroldo, Teo Jung. Tamen, nun malgraŭ sia konvinko resaniĝi, ŝi sentis sin malforta kaj tial konsentis pri rezigno sub la kondiĉo, ke la nova redakcio promesu respekti la ĝistiaman tradicion de la gazeto, speciale ĝiajn sendependecon kaj neŭtralan informan karakteron je la servo de la Esperanto-Movado. Tion akceptis Ari.

La unuflankan transdonan dokumenton (nun publike konata) subskribis la kvar membroj de la jura senprofitcela societo, kiu ĝis tiam, nome dum 36 jaroj, eldonis Heroldon: inter ili, Ada, subskribis sur la hospitala teraso, sidante en fotelo kaj apogante sin al kuseno. La gazeto, siatempe aĉetita, estis transdonita senpage.

Bedaŭrinde, post la forpaso de Ada la nova eldonanto perfidis sian propran promeson kaj utiligis Heroldon por personaj celoj: unue, li senrajte ŝanĝis la skribe interkonsentitan kolofonon por forigi la vorton „Movado” el la subtitolo; due, ligis la gazeton al kontraŭmovada teorio, kiu dividas la esperantistojn kaj kompromitas Esperanton; trie, subfosadis la organizitan movadon – kaj ĉefe UEA-n (al kies honora membraro apartenis Ada), ĝiajn UK-ojn kaj Belartajn Konkursojn - uzante en siaj skribaĵoj plurajn kaŝnomojn. Trompi la lastan volon de mortinto estas fia ago. Pro tio la transdono estis poste nuligita flanke de la transdoninta societo; la gazeto nun aperadas pirate.

Lasta vizito de la fratino.

Vizito de la fratino, ne plu prokrastebla, okazis artifike nome anoncante al Ada, ke la fratino venos al la malsanulejo kun la edzo, la filino, la bofilo, kaj du infanoj profitante de libertempo en suda Italio. Mi petis vizitantojn, kaŝi sian doloron, ne eniri ĉiuj kune en la ĉambron, ĉar paroli kun multaj personoj lacigus ŝin, resti ĉe unusola flanko de la lito por eviti, ke Ada turnu la kapon (kio kaŭzis doloron) kaj resti en la ĉambro ne pli longe ol po dek minutoj. Tiel okazis la 20-an de julio 1996. Unuan fojon, Ada ne ŝminkis sin: ŝi jam ne plu povis sidi en la lito, sed nur horizontale kuŝi en ĝi (foto aldonita). Unue envenis la fratino kun la edzo, aparte sekvis la nevino kun unu infano kaj fine, la bonevo kun alia filino. La fratino parolis pri estontaj planoj kaj invitis Ada kristnask-festi en Svislando, kio tre ĝojigis la malsanulinon.

Dum tiu vizito, ĉ. tri semajnojn antaŭ sia forpaso, Ada mirigis ĉiujn, parolante kvar lingvojn unu post la alia: kun la fratino ŝi konversaciis pole, kun la bofrato – armeno – ŝi parolis france, kun mi Esperante, kiel ĉiam: fine, envenis la ĉefkuracisto, kun kiu ŝi uzis la italan lingvon. Foririnte, jam en la lifto, la fratino preskaŭ svenis pro la emocio: ”Ada mortas, kaj mi rakontis al ŝi fabelojn!”.

La fino

En julio, la farto de Ada ŝrumpis semajnon post semajno. Ŝi restis senŝanĝe tre lucida, tamen forlasadis ŝin viv-interesoj, kiel radio-koncertoj de klasikuloj (ŝi ŝategis ĉiujn, plej elstare Chopin), televidaj dokumentaj filmoj pri natura vivo. Ŝi ne plu malfermis la alvenintajn leterojn, eĉ ne de la fratino. Iom post iom, ŝi entute rifuzis manĝi kaj oni devas nutri ŝin per flebo-krizo. Inkontinenton la doktoroj kontraŭstaris per katetero. Tiom da injektoj ŝi ricevis, ke viol-koloraj ekimozoj formiĝis en la koncernaj haŭto-partoj kaj la geflegistoj lasis en vejno konstantan tubeton, en kiun enigi la injektilon. Feliĉe, la doloroj plue forestis danke al la intensiva terapio. Ada ŝajne ne rimarkis la malbonan evoluon de la malsano, eble ŝia subkonscio rifuzis analizi la situacion. Nur unufojon ŝi surpriziĝis: "tamen, ne pliboniĝas!" Mi neis la evidenton, respondante, ke la foresto de la doloroj indikas, male, pliboniĝon. Surprize, tiu malsano kelkfoje montras neatenditajn trompajn pliboniĝojn ĉe paciento, sekvatajn de abismaj refaloj. Tial espero kaj malespero alternas.

Febron ŝi neniam havis: delira simptomo ege rare manifestiĝis, sed malaperis en kelkaj minutoj. Unu fojon, ŝi asertis, ke la ĉefkuracisto decidis, ke ŝi revenu hejmen kaj ke mi interkonsentu kun li pri la forveturo: kompreneble, temis pri revo. Iam, kvankam mi apud-estis ĉiutage, post mia foriro el la ĉambro ŝi preparis la ĉi-aldonitan leteron, anoncanta, ke la morgaŭan tagon ŝi revenos hejmen kaj volos paroli kun mi pri la gazetaj numeroj ĝis la fino de la jaro! Alian fojon, parolante pri la prezidanto de la pola komunumo en Torino, ĵus foririnta el ŝia ĉambro, Ada komentis: "Ĉu vi scias? Li kelkfoje mortas kaj poste renaskiĝas". Sed, tuj poste ŝi eksilentis, komprenante, ke io nelogika kuŝas en siaj vortoj. Kion ŝi fakte intencis diri, mi ne scias. Trian fojon: Ada asertis, ke dum la nokto ŝi aŭdis la doktorojn interparolantaj en pola lingvo en la koridoro. La aserto miksis realon kun fantazio: sendube, la nokte deĵorantaj doktoroj laŭte parolis en la koridoro, sed certe ne pole.

Laste, ŝi serioze anoncis, ke ŝi intencas resaniĝi: "Nun mi faros ĉion, kion la doktoroj postulas". Tion jam antaŭe ŝi estis farinta. Ŝi intencis diri, ke ĝis tiu momento, ŝi ne kredis esti malsana, sed ke ekde tiu momento ŝi trankvile akceptas la realon kaj volas kontraŭbatali ĝin. Ada ofte diris: "Tamen, la vivo estas bela!"

La ĉefkuracisto alvokis min en sia oficejo. "Preparu vin!" li diris. Duonkomao daŭris tagojn. Ada preskaŭ senhalte dormis, sed vekigis de tempo al tempo dum kvaronhoro. "Mi dormas la tutan tempon", ŝi rimarkis. „Bone!", mi denove mensogis, „dum la dormo la organismo plifortiĝas; vi ege laboris la tutan vivon, nun estas bone, ke vi ripozu". Venis komao tiel longedaŭra, ke la ĉefkuracisto rimarkigis al mi: „Kia mortado! Ŝia korpo batalas per ĉiuj energioj kontraŭ la fino". La lastajn du tagojn, ŝi ne plu rekonsciiĝis, tamen iel aŭtomate ŝi movis la dekstran manon kvazaŭ por montri skrib-emon: mi enmanigis al ŝi plumon kaj apudigis paper-folion, sur kiun ŝi fakte skribis kelkajn izolitajn vortojn, parte nelegeblajn. Pro spir-malfacilaĵoj, la flegistinoj aplikis al ŝi oksigenilon. Nenio utilis. La 7-an de aŭgusto 1996 iom post 3-a horo nokte Ada transiris dedormo al morto.

La korpo, kovrita per la pola kaj Esperanta flagoj, aspektis tre serena, preskaŭ dormanta: du faldetoj inter la brovoj donis la impreson, ke ŝi mense koncentriĝas je iu penso. Multaj esperantistoj el diversaj urboj, pol-devenaj torinanoj kaj parencoj adiaŭis ŝin en la funebra ĉambro. Inter la vizitantoj troviĝis la ĉefkuracisto, kiu diris: „Ankaŭ el homa vidpunkto mi ĝojas, ke mi konis tiel eksterordinaran virinon!" Dum semajnoj alfluadis kondolencaj mesaĝoj el la tuta mondo – preskaŭ 200 entute –, nun gardataj en du grandaj albumoj: kelkaj skribintoj,

kiel vjetnama esperantisto kaj W. Auld, verkis poemojn en ŝia rememoro. El la gazetaj artikoloj, plej signifa estas la ĉi-aldonita priskribo de Ada fare de ĉina ĵurnalistino.

La lasta ceremonio okazis plej simple: mi petis, ke neniuj – krom mi kaj mia gekuzoj – akompanu la ĉerkon ĝis la tombejo, kie laŭ ŝia volo ŝi estis cindrigita kun laika ceremonio, ĉar ŝi estis agnostika kiel mi.

Tiel finiĝis la vivo de Ada, Aduŝka.

**(El „Ĉina Interreta Informilo”)
Januaro 2002**

Kiu estas kiu en Esperantujo

Ada – Senlaca Semanto en Esperantujo - de Wang Lihua

Mi konatiĝis kun s-ino Ada Fighiera-Sikorska (1929-1996), redaktoro de „Heroldo de Esperanto”, dum la 80-a UK en Tampere, Finnlando, somere de 1995.

Loĝante kun ŝi en la sama hotelo, mi renkontis ŝin ĉiutage dum la tuta kongresa semajno. Ŝi estis svelta, emis blue kolorigi siajn palpebrojn kaj uzi malhel-ruĝigilon kaj rozan ungo-vernison. Koliero el perloj pendis sur ŝia kolo. Ŝi marŝis rapide kaj ankaŭ parolis rapide, tamen entuziasme kaj bonhumore.

„Jen talenta virino!” mi pensis en mi, rigardante ŝin rapide foriranta malproksimen.

Estas mirinde, ke virino tute sola redaktis kaj eldonis gazeton pli ol 30 jarojn. Tio vekis grandan scivolemon en mi kaj s-ino Wang Yuqinn, redaktoro de la Ĉina Radio Internacia. Ni kaptis ŝin dum matenmanĝo kaj interkonsiliĝis kun ŝi pri nia intervjuo.

Tiuvespere ŝi venis en nian ĉambron. Ni gustumis konfitaĵojn, kiujn ni kunportis. Kvankam ŝi parolis rapide, tamen ŝia tono estis milda. Mi kaj s-ino Wang bombardis ŝin per demandoj. Ŝi ĝoje respondis kaj rakontis al ni sian malfeliĉan infanecon.

Ŝi naskiĝis en Siedlce, Pollando, la 26-an de januaro 1929. Malfeliĉe, milito eksplodis en 1939. Nur 10-jara, ŝi ja spertis kruelaĵojn de la milito. Ŝia patro Sikorski, generalo, kune kun miloj da aliaj polaj oficiroj estis murdita de malamikoj. Dume ŝi, ŝiaj patrino kaj fratino estis eskortitaj al Siberio. Nur en 1942 ŝia familio sukcesis forlasi Sovetunion kaj en novembro 1948 ŝi revenis al la patrujo.

Ada studis en universitato de Varsovio. Influate de esperantistoj-studentoj, ŝi eklernis Esperanton en kurso, kiun gvidis s-ro Julio Baghy, fama Esperanta verkisto kaj poeto.

„Mi estas feliĉa, ke mi havis tiel bonan Esperanto-instruiston. Dank’al li, mi faris grandan progreson kaj sukcesis en ekzamenoj elementa kaj mezgrada. Poste mi aliĝis al E-organizo”, diris Ada kun granda ĝojo.

